

Paderborner

FEoLL

Arbeitspapiere

Institut für Kybernetische Pädagogik

2. Werkstattgespräch

"Interlinguistik in Wissenschaft und Bildung"

2-a Laborkonferenco

"Interlingvistiko en Scienco kaj Klerigo"

Redaktis: Hermann Behrmann

Arbeitspapier Nr. 38

2. Werkstattgespräch
"Interlinguistik in Wissenschaft
und Bildung"

2-a Laborkonferenco
"Interlingvistiko en Scienco
kaj Klerigo"

Redaktis: Hermann Behrmann

Paderborn, Februar 1978

Druck: Forschungs- und Entwicklungszentrum für objektivierte
(C) Lehr- und Lernverfahren (FEoLL) GmbH

Der Nachdruck ist bei Quellenangabe gestattet. Nutzung für
gewerbliche Zwecke bedarf der Genehmigung.
Represo permesita kun fontindiko. Komerca uzo agnoskenda.

Enhavo / Inhalt

Antaŭparolo / Vorwort	4
Michel DUC GONINAZ: Sociolingvistikaj problemoj en la funkciado de universala lingvo - la ekzemplo de Esperanto (Soziolinguistische Probleme in Funktionieren einer universellen Sprache - das Beispiel Esperanto)	5
Ivo Lapenna: Kelkaj juraj aspektoj de la multlingveco en Eŭropa Ekonomia Komunaĵo (Einige juristische Aspekte der Vielsprachigkeit in der Europäischen Gemeinschaft)	10
Fabrizio A. PENNACCHIETTI: Enkondukaj teoriaj konsideroj ĉirkaŭ la temo "La nomigo en Esperanto kaj provo ĝin formalizi" (Einige theoretische Betrachtungen zum Thema "Die Benennung im Esperanto und der Versuch ihrer Formalisierung")	15
Horst RICHTER: Robbimat kaj liberelekta aŭtomato kiel ekzemploj por alternaj principoj de instrumaŝinoj (Robbimat und Freiwahl-Automat als Beispiel für alternierende Lehrmaschinen-Konzepte)	51
Magda ŠATUROVÁ: Bazaj leksikografiaj principoj ĉe du-lingvaj vortaroj (Grundlegende lexikografische Prinzipien bei zweisprachigen Wörterbüchern)	69
Wolfgang F. SCHMID: Agad-anticipo en la konscio (aktuala memoro) (Handlungsvorwegnahme im Bewußtsein (Kurzspeicher))	77
Richard SCHULZ: Filozofaj konsideroj pri la strukturo de la Internacia Lingvo (Philosophische Betrachtungen über die Struktur der Internacia Lingvo)	86
István SZERDAHELYI: Interlingvistiko - historia trarigardo, nuna stato, perspektivo (sinteza resumo de 3 prelegoj) (Interlinguistik - geschichtlicher Überblick, heutiger Stand, Ausblick (Zusammenfassung von 3 Vorträgen))	100
Programo de la Laborkonferenco (Programm des Werkstattgesprächs)	127

Fabrizio A. Pennacchietti (Universitato de Venecio)

Enkondukaj teoriaj konsideroj ĉirkaŭ la temo "La nomigo en Esperanto kaj provo ĝin formalizi"

MODELO DE SEMANTIKA BILDIGO DE LA FRAZO

Laŭ tre ĝenerala vidpunkto, lingvo povas esti konceptita kiel laŭpove senfina are da interrespondej inter sonoj kaj signifoj. Ĝi estas specifita a) de senfina are da signifoj, b) de senfina are da fonetikaj formoj kaj c) de mekanismo kiu sisteme asocias kun ĝiu ebla signife determinitan fonetikan formon (kaj inverse). Ni nomos tiun mekanismon "projekcia mekanismo" kaj ni asertos ke ĝi projekcias la semantikajn bildigojn en eksterajn formojn kaj inverse.


Por utile starigi la problemon pri la tipologio de certa lingvo estas necese konsideri, kian tipon de operacioj devas plenumi la projekcia mekanismo en iu ajn lingvo. Tiu konsidero postulas siavice, ke oni disponu sufiĉe precizan karakterizon de la semantika bildigo unuflanke, kaj de la ekstera formo aliflanke, ĉar ĝuste sur ili du operacias la projekcia mekanismo. Nu, la ekstera formo de frazo en ĝiu lingvo estas la linĉa, tempe ordigita sinsekvo de fonologie specifitaj formaĵoj (morfemoj). Ĉi lastaj povas esti konsideritaj la "elmetaĵo" (output) de la projekcia mekanismo kaj la "enmetaĵo" (input) memklare estas la semantika bildigo de la frazo mem.

Dum la naturo de la ekstera formo de frazo estas relative prikonsentebla, ĉar ĝi estas certagrade alirebla por rekta observado, la formo de la semantika bildigo de frazo ne estas same prikonsentebla, ĉar ĝi necese dependas de certa modelo pri la lingvo. En tiu ĉi pritrakto ni alprenos modelon de semantika bildigo, kiu enkadriĝas en la genera gramatiko kaj aparte inspiroĝas al tiu disvolviĝo, kiu pleje okupiĝis pri la semantika problemo kaj kiu nomiĝas "genera semantiko".


Laŭ tiu ĉi modelo la semantika bildigo de frazo konsistas esence el kunfiguro da elementaj semantikaj komponantej, ĝiu el kiuj havas la formon de korelacio inter du "argumentoj". Ekzemple, la frazo (1) la simileco de Aleksandro kun Bernardo estas granda ricevas la semantikan bildigon (2):

(2)

"La simileco de Aleksandro kun Bernardo estas granda"



Ni ekzamenos pli sube, en kiaj aspektoj nia modelo pri semantika bildigo de frazo diferencas de la plej konataj modeloj de la "klasika" genera semantiko (kp. Lexikon der Germanistischen Linguistik, Studienausgabe I, Max Niemeyer Verlag, Tübingen 1973, p. 212-213; D. Parisi - F. Antinuoci, Elementi di grammatica, Boringhieri ed., Torino 1973; F. Antinuoci, Fondamenti di una teoria tipologica del linguaggio, Il Mulino ed., Bologna 1977). Laŭ tiuj modeloj, la unuopaj semantikaj komponantoj hierarkie organiziĝantaj havas, kiel konate, la formon de predikato kun unu aŭ pli da "argumentoj", tiel ke al (1) respondas la jena bildigo :



De malsupre supren tiu ĉi kunfiguro da semantikaj komponantoj legiĝas jene :
persono x nomiĝas ALEKSANDRO (= ARG 1); ARG 1 ESTAS-SIMILA-AL BERNARDO (= ARG 2);
persono y nomiĝas BERNARDO (= ARG 3); ARG 3 ESTAS-SIMILA-AL ALEKSANDRO (= ARG 4);
ARG 4 ALDONIGAS-AL ARG 2, tio estas : Aleksandro KAJ Bernardo estas RECIPROKE
similaj (= ARG 5); ARG 5 ESTAS-GRANDA, t.e. : la simileco de Aleksandro KAJ Ber-
nardo estas granda.

La ĉefa diferenco, kiel oni vidas, kuŝas en la fakto, ke en nia modelo la unuopaj
semantikaj komponantoj havas ĉiam kaj nur du "argumentojn" kaj ke la predikato
estas konsiderata kiel unu el la du "argumentoj" de speciala tipo de korelacio aŭ
semantika komponanto.

LA PROJEKCIA MEKANISMO EKDE LA SEMANTIKA STRUKTURO DE FRAZO AL ĜIA SURFACA STRUKTURO

Nun, revenante al la rilatoj inter la frazo (1) kaj ĝia semantika strukturo (2),
la plej grava observinda fakto estas, ke, dum (1) estas, kiel jam dirite, linĉa
sinsekvo de songrupoj, kiuj organiziĝas surbaze de antaŭeca rilato, kiel "la simi-
leco antaŭas al de", "de antaŭas al Aleksandro", "Aleksandro antaŭas al kun" k.t.p.,
(2) estas male organizita en hierarkia maniero. Ne ekzistas do ia ajn antaŭeca
rilato en (2), sed nur hierarkia strukturo, dank' al kiu malalta du-"argumenta"
korelacio fariĝas unu el la du "argumentoj" de pli supra korelacio, ĝis kiam
formiĝas la du "argumentoj" de predikata korelacio, kiu regas la tuton.

Tasko de la projekcia mekanismo de la lingvo estas transformi (2) en (1) kaj
inverse. Por tiu celo la lingvo uzas du rimedojn : la leksikon kaj la sintakson.
La leksiko estas aro da interrespondoj inter subkunfiguroj da semantikaj korela-
cioj kaj fonologiaj etiketoj. Ĝi operacias en du manieroj : eltondante el la
semantika strukturo de la frazo subkunfigurojn da korelacioj kaj asociante ilin
kun respondaj fonologiaj etiketoj (tiamaniere oni ekhavas la leksemojn) kaj tradu-
kante la semantikan rilaton inter la "argumentoj" pere de korelaciaj signaloj
(tiamaniere oni ekhavas la morfemojn). Ekzemple, el (2) oni povas eltondi la
korelacion inter la "argumentoj" EST- kaj GRANDA kaj ĝin asocii kun la verba-leksemo
grand- de (3) grandas la simileco de A. kun B. kaj traduki la subjekto-predikatan
rilaton inter la "argumentoj" de la plej alta korelacio de (2) -asignante al la
etiketo grand- la tensan morfemon -as : grandas.

La sintakso kontraŭe estas aro da interrespondoj inter la rilatoj de la "argumentoj" (la korelaciaj subkunfiguroj eltonditaj de la leksiko) kaj la relativaj pozicioj de la elementoj, kiuj ilin leksikigas en la linĉa sinsekvo de la frazo. Alivorte, la informo entenita en hierarkia bildigo kiel (2) estas manifestata pere de la samtempa uzo de du sistemoj: grupoj da sonoj kaj linĉa ordo rilata al tiuj songrupoj. Se ni momente apartigas la leksikon, pro la fakto ke ĝi povas aperi kiel fermita listo da interrespondoj, la operaciado de la projekcia mekanismo ŝajnas esti precipe la enlinĉigo de hierarkia strukturo semantika, fare de la parolanto, kaj, inverse, la transformo de enlinĉigita surfaca strukturo en hierarkiigitan semantikan strukturon plejeble similan al la origina, fare de la aŭskultanto.

KION PROJEKCIAS LA RILATAJ MORFEMOJ

Ni ĵus asertis, ke la leksiko havas la duoblan taskon projekcii subkunfigurojn da semantikaj korelacioj en leksemojn kaj signali la naturon de iliaj reciprokaj semantikaj rilatoj pere de morfemoj. Antaŭ ol alfronti la problemon, kiamaniere la leksiko (aŭ la leksika projekcia sistemo) kreas la lekseman klason de la nomoj, ni provu esplori, ĉu estas eble klasifi la morfemojn, nome la korelaciajn signalojn, laŭ la tipo de korelacio, kiun ili signalas.


Por tion fari, la unua paŝo estas kompreni, ke ĉiu korelacio privilegias unu el ĝiaj du "argumentoj" fokusigante ĝin. Ni simboligas la fokusigitan "argumenton" per triangulo (\triangle) kaj la nefokusigitan per cirklo (\circ).

Nu, laŭ nia modelo, ekzistas du ĉefaj klasoj da korelacioj. Ili reciproke distingigas dank' al la kriterio, ĉu la nefokusigita "argumento" estas markita aŭ ne de la semantika trajto de "samtempeco aŭ samspaceco" rilate al la fokusigita.


Kiamaniere oni povus jam dividi la korelaciajn signalojn (morfemojn) en du klasojn: tiuj, kiuj signalas, ke la koncernita leksemo verba aŭ noma estas projekciaĵo de "argumento" markita de la trajto de samtempeco aŭ samspaceco rilate al la alia "argumento" de la korelacio kaj tiuj, kiuj signalas la mankon de tiu semantika trajto.

Se la nefokusigita "argumento" (\circ) estas mense konstruita kiel "samtempa aŭ samspaca" rilate al la fokusigita "argumento" (\triangle), en la bildigo ĝi estas metita dekstre de \triangle . Ni konsideru ekzemple la korelaciojn (4) kaj (5) :

(4)



(5)




En la korelacio (4), kiu surfacem estas projekciata per la prepozicio kun kaj la vortordo Aleksandro + kun Bernardo, la "argumento" BERNARDO estas markita de la trajto "samtempa kiel la fokusigita argumento ALEKSANDRO", ĉar ankaŭ se la personoj Aleksandro kaj Bernardo apartenas al diversaj epokoj, la korelacio (4), kiel ni vidos poste, konstituas la rezulton de transformo de antaŭsupozita korelacio, kiu estas surfacem projekciebla per la du kunordigitaj frazoj [oni asertas, ke] Aleksandro (tiel, kiel nomiĝas la persono X) estas simila al Bernardo kaj [samtempe oni asertas, ke] Bernardo (tiel, kiel nomiĝas la persono Y) estas simila al Aleksandro. Nur en tiu ĉi senco la "argumento" BERNARDO estas markita kiel "samtempa" rilate al la fokusigita "argumento" ALEKSANDRO.


Siavice, en la predikata korelacio (5), kiu reprezentas la kernon de la tuta korelacia kunfiguro (2), la nefokusigita "argumento" EST-/GRANDA, kiu surfacem estas projekciata per verbo [kp. (3) grandas] aŭ per kopulo kaj predikativo [kp. (1) estas granda], estas ankaŭ konstruita kiel "samtempa" rilate al la fokusigita "argumento" (projekciita per la subjekto la simileco de Aleksandro kun Bernardo), ĉar \circ karakterizas \triangle 'n per kvalito, kiu \triangle tiutempe posedas.

Male, se la "argumento" \bigcirc ne estas markita de la semantika trajto de "samtempeco aŭ samspaceco" rilate al \triangle , en la bildigo \bigcirc estas metita maldekstre de \triangle . Ni konsideru ekzemple la korelaciojn (6) kaj (7):

(6)



(7)




En (6) la rilato de samtempeco inter \bigcirc (projekciita per la prepozicia sintagmo de Aleksandro kun Bernardo) kaj \triangle (projekciita per la nomigo la simileco) estas tute superflua, ĉar la SIMILECO povas daŭri ankaŭ kiam la personoj ALEKSANDRO kaj BERNARDO jam malaperis.

Neniun rolon ludas same la rilato de samtempeco inter la \bigcirc (projekciita per la predikativa adjektivo granda) kaj la \triangle (projekciita per la kopule estas) de la korelacio (7). Ili estas ambaŭ konstruitaj sendepende kaj de tempaj kaj de spacaj konsideroj kaj simple koincidas. La tensa morfemo -as, kiel korelacia signalo, koncernas nur la korelacion (5).

Resume, laŭ nia modelo de semantika bildigo de la frazo, la semantikaj rilatoj inter la "argumentoj" de korelacio dividiĝas en du grandajn klasojn: a) la rilatoj en kiuj la nefokusigita "argumento" estas markita per la semantika trajto de "samtempeco aŭ samspaceco" kun la fokusigita "argumento" kaj b) la rilatoj, en kiuj la nefokusigita "argumento" ne estas koncernata de tiu semantika trajto.

Sekve, ni povas nomi la korelaciojn, kiuj falas en la klason a), markitaj korelacioj kaj nomi male nemarkitaj korelacioj la korelaciojn, kiuj falas en la klason b):

markita korelacio



nemarkita korelacio



Al la markitaj korelacioj respondas en la surfaco markantaj morfemoj kaj al la nemarkitaj korelacioj respondas nemarkantaj morfemoj. La apero de tiaj morfemoj tamen ne estas nepra, ĉar la rilatoj de markiteco aŭ de nemarkiteco povas esti simple signalataj de la sintaksa projekcia sistemo pere de aparta vortordo.

Ciukaze la supre indikita kriterio ne estas ankoraŭ sufiĉa por kontentige klasifi la korelaciojn, nome la semantikajn rilatojn, kiuj stariĝas inter la du "argumentoj" de korelacio. Paŝon antaŭen oni faras al tiu celo, se oni al tiu kriterio aldonas duan, kiu koncernas kaj la markitajn kaj la nemarkitajn korelaciojn. Ĝi konsistas el la fakto, ke en certaj korelacioj la fokusigita "argumento" (\triangle) pravigas la semantikan funkcion de la nefokusigita "argumento" (\circ); dum en aliaj korelacioj estas la nefokusigita "argumento" (\triangle) kiu pravigas la semantikan funkcion de la fokusigita (\circ).

Temas pri tre ĝenerala koncepto, kiu povas klarigi nur per ekzemploj. Ni opinias, ke en rilato stariĝinta ekzemple inter subjekto (\triangle) kaj predikato (\circ), inter kopulo (\triangle) kaj predikativo (\circ), inter subjekto-predikata korelacio (\triangle) kaj lokativo markita aŭ nemarkita (\circ), aŭ ĝenerale adverbo (\circ) aŭ adverbeca komplekso (\circ), k.t.p. estas la fokusigita "argumento" \triangle kiu ĉefe pravigas la semantikan funkcion de la nefokusigita \circ .


Male, en rilato stariĝinta ekzemple inter instrumentalo (○) kaj subjekto-predikata korelacio (△), inter objekto (○) kaj transitiva verbo (△), inter agentivo (○) kaj pasiva verbo (△), inter epiteta adjektivo (○) kaj la koncerna substantivo (△), inter relativa propozicio (○) aŭ genitivo (○) kaj la reganta substantivo (△) k.t.p. estas la nefokusigita "argumento" ○ kiu pravigas la semantikan funkcion de la fokusigita △.

Generale, oni povas diri, ke en certaj kazoj ○ gravitas ĉirkaŭ, direktiĝas aŭ aplikiĝas al △; dum en aliaj kazoj △ gravitas ĉirkaŭ, direktiĝas aŭ aplikiĝas al ○. En nia modelo de bildigo, la senco de la "apliko" estas indikata de horizontala sageto metita inter la du "argumentoj" de korelacio.

Surbaze de tiu ĉi kriterio ni nomos la korelaciojn, en kiuj △ aplikiĝas al ○, aplikaj korelacioj kaj la korelaciojn, en kiuj ○ aplikiĝas al △, retroaplikaj korelacioj.

Kruicigante nun la klasojn de markitaj kaj nemarkitaj korelacioj kun la klasoj de aplikaj kaj retroaplikaj korelacioj, ni ekhavas la jenan krandon de kvar subklasoj de korelacioj, al kiuj surface respondas apartaj subklasoj de morfemoj:

- I - la nemarkitaj aplikaj korelacioj (NAK);
- II - la markitaj aplikaj korelacioj (MAK);
- III - la nemarkitaj retroaplikaj korelacioj (NRK);
- IV - la markitaj retroaplikaj korelacioj (MRK):



Laŭ nia opinio, tiuj ĉi kvar subklasoj de la korelacioj troviĝantaj en la semantika strukturo de la frazo estas signalataj en ĝia surfaca strukturo de la jenaj morfemoj :

Prepozicioj

	NEMARKANTAJ	NEŬTRALAJ	MARKANTAJ
ANTAJ	al, je, ĉe, ĝis, pro	por	en, dum, tra, inter, sur, super, antaŭ, kontraŭ, ĉirkaŭ, preter, trans
KANTAJ	de, el, da, pri, ol, post, malantaŭ, krom, ekster, anstataŭ, sub	malgraŭ	per, sen, kun, apud, laŭ


Konjunkcioj, subjunkcioj kaj aliaj morfemoj

	NEMARKANTAJ	NEŬTRALAJ	MARKANTAJ
KANTAJ	-e (adverbo); -al, -am, -om, -e, -ol, -en; ĉar, kvankam; kvazaŭ; se; tre, tro, pli, plu; ĝis; -Ø (predikativa nomin.)	-ante, -ate, -inte, -ite, -onte, -ote	-as, -is, -os, -us, -u, dum, -n (akuzativo de movo)
OKANTAJ	-a, -es, k- (relativa morfemo), ol		kaj, nek, aŭ, sed; -n (akuzativo de objekto, tempo kaj mezuro)

Neŭtralaj estas la morfemoj, kiuj estas simple aplikantaj aŭ retroaplikantaj, nome tiuj, kiuj laŭ la okazoj kapablas signali aŭ markitan aŭ nemarkitan korelacion, ekzemple li laboros (Δ) por vi (\circ), kie por signalas NAK, kaj li laboros (Δ) por multaj jaroj (\circ), kie por signalas MAK.

La supre proponitaj interrespondoj inter la diversaj subklasoj de rilataj morfemoj kaj la koncernaj subklasoj de semantikaj rilatoj (korelacioj) ebligas nin reskribi la semantikan strukturon de la frazo (1) per la bildigo (2'), kie la morfemoj, por plifaciligi la legadon de la bildigo, estas enmetitaj en la cirkloj simboligantaj la nefokusigitajn "argumentojn" :

(2')



LA HIERARKIA ORDO DE LA SEMANTIKAJ RILATOJ

Ĝis nun ni provis klasigi la diversajn tipojn de korelacioj, kiuj povas aperi en la semantika strukturo de la frazo, en kvar bazajn klasojn de semantikaj rilatoj kaj sekve ni proponis iun kradon da interrespondoj inter tiuj korelaciaj klasoj kaj la rilataj morfemoj, kiuj devas ilin signali en la surfaca strukturo de la frazo.

Estas nun tempo por alfronti la problemon, kiamaniere la korelacioj organiziĝas hierarkie en la interno de la semantika strukturo.

Ni tion faros adoptante la terminologion de C.J. FILLMORE (vidu The Case for Case, en E. BACH - R. HARMS (eds.), Universals in Linguistic Theory, New York, Holt, Rinehart and Winston, 1968; idem, Some Problems for Case-Grammar, Georgetown, Round Table on Linguistics, Georgetown University, 1971) pri la "semantikaj kazoj". Laŭ la "kaza gramatiko" de Fillmore, la rilato inter verbo kaj la diversaj substantivaj sintagmoj de propozicio restas konstanta kvankam la surfaca formo de la frazo povas ŝanĝiĝi. Tiu profunda semantika rilato estas nomata ĝuste "semantika kazo", kaj inter la ŝefaj "kazoj", kiujn Fillmore proponis, estas la jenaj :

la Objektivo [O] - la semantike plej neŭtrala el la "kazoj" : ĝi estas la kazo de la nomo, kies rolo en la ago aŭ stato esprimata de la verbo estas identigebla pere de la semantika interpreto de la verbo mem;

la Agentivo [A] - la kazo de la aŭtoro de la ago esprimata de la verbo; tiu aŭtoro estas sentita kiel animita.

la Instrumentalo [I] - la kazo de la senanima forto aŭ objekto hazarde implikita en la ago aŭ stato identigita de la verbo;

la Lokativo [L] - la kazo, kiu esprimas la situon aŭ la spacan orientiĝon de la ago aŭ stato esprimita de la verbo;


la Dativo [D] - la kazo de la animita estaĵo interesita de la ago aŭ stato esprimita de la verbo;

la Benefaktivo [B] - la kazo de la animita estaĵo, por kiu oni plenumas certan agon aŭ okazas certa stato.


Ni provas bildigi la semantikan strukturon de kelkaj frazoj kaj parafradoj, kiuj entenas diversajn kazojn de Fillmore, demonstrante, ke ĉiu "semantika kazo" estas karakterizita per aparta hierarkia kunfiguro de korelacioj. Tiuj korelacioj povas ŝanĝi "signon" kiel nombro, t.e. transpasi de unu klaso al alia (povas, ekzemple, de NRK fariĝi MAK kaj inverse, de NRK fariĝi MAK kaj inverse k.t.p.), sed ili ĉiam konservas la "argumentojn" en la sama reciproka pozicio (unu ĉiam dekstre, la alia ĉiam maldekstre) eĉ en la parafradoj. Estas tamen por rimarki, ke laŭ nia modelo estas rekonata al la Akuzativo (kiun ni simboligas provizore per [N]) la dignecon de memstara profunda kazo, dum laŭ Fillmore (1968) la kazoj D kaj O karakterizas kaj la animitan (D) aŭ senaniman (O) subjekton de ne-agentiva verbo, kaj la animitan (D) aŭ senaniman (O) objekton de agentiva verbo, tiamaniere ke Akuzativo aperas kiel pure surfaca fenomeno.

Por pli facile identigi la unuopajn korelaciojn dum ĝiaj transformiĝoj, ni distingas ĉiun el ili per aparta numero, komence de la korelacio respondanta al la plej elementa frazo.

Ni komencas per la minimuma frazo (8) la ĉevalo [D] haltis :




(10) okazis la halto [O] de la ĉevalo [D] : (11)




(12) la gaŭĉo [D] igis tiel ke la ĉevalo [D] haltu kaj la ĉevalo [D] haltis :

(13)



(14) la ĉevalo [D] haltis kaŭze (/age) de la gaŭĉo [D] :


(15)




(16) ⁺ la gaŭĉo [A] igis la ĉevalon [N] tiel ke ĝi [D] haltu (/estu haltanta) ⇒

(16') la gaŭĉo [A] igis la ĉevalon [N] halti (/esti haltanta) :

(17)



(17')




Leksika transformo : MAK 4 + NAK 5 ⇒ NAK 8, se ekzistas MAK 7 + MRK 6.


(16') la gaŭĉo [A] igis la ĉevalon [N] halti (/haltanta) ⇒

(18) la gaŭĉo [A] haltigis la ĉevalon [N] :

(17')



(19)




(20) i) la gaŭĉo [D] agis tiel ke la halto [O] de la ĉevalo [D] okazu kaj la halto [O] de la ĉevalo [D] okazis ⇒

ii) + la gaŭĉo [A] igis la halton [N] de la ĉevalo [D] okazi ⇒

iii) la gaŭĉo [A] okazigis la halton [N] de la ĉevalo [D] ⇒


iv) la gaŭĉo [A] kaŭzis la halton [N] de la ĉevalo [D] :

(21)




(22) la gaŭĉo [A] haltigis la ĉevalon [N] kaj lia lazo [I] haltigis ĝin [N] :

(23)




(24) la gaŭĉo [A] haltigis la ĉevalon [N] per lazo [I] :

(25)




(26) la lazo [I] haltigis la ĉevalon [N] por la gaŭĉo [B] :

(27)




(28) la ĉevalo [D] estis haltigita de la gaŭĉo [A] :

(29)




(30) la ĉevalo [D] estis haltigita de la lazo [I] : (31)




(32) la ĉevalo [D] estis haltigita de la gaŭĉo [A] per lazo [I] :

(33)




(34) okazis la haltigo [O] de la ĉevalo [D] per lazo [I] far la gaŭĉo [A] :

(35)




(36) tio [O], kion [N] faris la gaŭĉo [A] al la ĉevalo [D], estis haltigi ĉin [N] :


(37)




(38) la gaŭĉo [A] faris al la ĉevalo [D] la agon [N] haltigi ĝin :




(40) la gaŭĉo [D] faris , ke la ĉevalo [D] haltu :



(42) tio [O] okazis en la pampo [L] :




(44) tio [O] okazis ĉe la herbejfino [L] :




TABELO DE LA KORELAGIAJ SUBKUNFIGUROJ RESPONDANTAJ AL LA SEMANTIKAJ KAZOJ DE FILLMORE

[D] - Dativo [+ animita]

a) subjekto de netransitiva verbo :



b) celo de verbo :




c) "posedanto" :




[O] - Objektivo [- animita]

subjekto de netransitiva verbo :




[A] - Agentivo [+ animita]

a) subjekto de transitiva verbo :




b) agant-adjekto ;




[I] - Instrumentalo [-animita]


a) instrumento :



b) neanimita subjekto :



[B] - Benefaktivo



Estis preterlasitaj la bildigojn de frazoj kun ne-agaj transitivaj verboj kiel

a) Karlo [D] havas biciklon [N], b) Karlo [D] vidis floron [N], c) la dosiero [L] entenas leterojn [N], k.t.p..

NOMA EKSPANSIO KAJ NOMIGO.

En la antaŭaj paĝoj ni havis la okazon vidi, kiamaniere estas bildigebla, laŭ la adoptita modelo pri la semantika strukturo de frazo, la hierarkia interrilato inter diversaj korelacioj.

Pri la subjekto-predikataj korelacioj eblas rimarki, ke ili povas fariĝi la pivoto de pli supraj korelacioj, ludante la rolon de ties fokusigita "argumento" (\triangle). Tio okazas ekzemple en la kaŭza NAK 6 de (15), respondanta al (14) la ĉevalo haltis KAŬZE DE la gaŭĉo aŭ PRO la gaŭĉo; en la benefaktiva NAK 9 de (27), respondanta al (26) la lazo haltigis la ĉevalon POR la gaŭĉo; en la lokativa NAK 25 de (45), respondanta al (44) tio okazis ĈE la herbejfino (kie la "argumento" HERBEJO estas semantike konstruita sen ia ajn spaca dikeco, esprimante nur idean linion markantan la randon de herbejo); en la lokativa MAK 24 de (43), respondanta al (42) tio okazis EN la pampo (kie la "argumento" PAMPO estas semantike konstruita kun la spaca dikeco de loko entenita interne de certaj limoj); en la konjunkcia MRK 6 de (13), respondanta al (12) la gaŭĉo agis ... KAJ la ĉevalo haltis; kaj fine en la instrumentala MRK 9 de (25), respondanta al (24) la gaŭĉo haltigis la ĉevalon PER lazo. En ĉiuj kazoj de la subjekto-predikata korelacio ekspansias supren.

Pri la verba "argumento" de subjekto-predikataj korelacioj oni rimarkas kontraŭe, ke ĝi kapablas fariĝi la pivoto (\triangle) nur de malsupraj korelacioj, ekzemple la "akuzativa" MRK 6 de (19), respondanta al (18) ... haltigis la ĉevalo-N; la cela NAK 19 de (37), respondanta al (36) ... faris (ion) AL la ĉevalo; kaj la maniera NAK 5 de (13), respondanta al (12) ... agis TIEL KE la ĉevalo haltu. Tiesence maniera estas ankaŭ la predikativa NAK EST-/GRANDA de (2), projekciata de (1) la simileco ... estas granda, frazo kiu fakte respondas al la demando kiel aŭ kia estas tiu simileco?. La verba "argumento" ekspansias do nur malsupren.

La saman oni rimarkas pri la nomaj "argumentoj", kiuj jam reprezentas la pivoton (\triangle) de subjekto-predikataj korelacioj, kaj ankaŭ pri ĉiuj aliaj nomaj "argumentoj",


kiuj aperas kiel nefokusigita "argumento" de la diversaj korelacioj de la frazostrukturo, ĉar ili ĝenerale kapablas fariĝi nur la pivoto (Δ) de malsupraj korelacioj. Ilia semantika ekspansio direktiĝas do nur malsupren.

La nomaj "argumentoj" havas tamen tute specialan prerogativon. Ili povas konstitui la rezulton de transforma procezo, kiu venas de malsupre, t.e. kreiĝi dank' al la ekstraktado de certa noma aŭ verba aŭ predikativa "argumento" el jam formita aŭ antaŭsupozita frazostrukturo.

Tiu ĉi trans-formo de verba aŭ predikativa "argumento" en noman "argumenton" kaj tiu ĉi re-formo de noma "argumento" en novan "argumenton" noman povas esti indikata per la termino "nomigo" (Nominalisierung).

La nomigo, el la kognitiva vidpunkto, servas por apogi la semantikan enhavon de certa frazo sur la firmajn pilastrojn starigitajn de jam konataj aŭ supozite konataj informoj, kiujn alportis antaŭe eldiritaj frazoj. Kontraŭe, el la komunika vidpunkto, la nomigo, tiel kiel ĝi estas projekciata en la surfaca frazostrukturo, garantias la "logikan" interligon kaj konekton inter la frazoj, el kiuj konsistas la homa parolado. Ciu nomigita vorto funkcias fakte kiel ĉenero inter nova frazo kaj la frazoj, ^{kiuj} eldirigis antaŭ ĝi en la linia sinsekvo de la tempo kaj kiuj reprezentas ĝian kuntekston, eksplicite aŭ implicate.


Kiam la frazo, el kiu oni ekstraktas, estas eksplicita, la nomiga procezo povas esti bildigita per la jena minimuma korelacia subkunfiguro :



Temas pri NRK, kies fokusigita "argumento" (pivoto) estas nova noma "argumento" kaj kies nefokusigita "argumento" estas subjekto-predikata korelacio (MAK).

Ni imagu nun, ke la antaŭsupozita frazo, el kiu oni ekstraktas semantikan "argumenton", estas la aserto (46) (iu) ŝevalo haltis, frazo kiu diferencas de (8) la ŝevalo haltis pro la fakto, ke al ĝia subjekto mankas la artikolo la. El tiu ĝi frazo oni povas ekstrakti aŭ la nomon "argumenton" ŜEVALO aŭ la verban "argumenton" HALT-.


En la unua kazo ni ekhavas la novan nomon subkunfiguron (47), al kiu respondas en la surfaco la noma sintagmo (48) la ŝevalo, kiu haltis (estis kaptita de paŭĉo):



En (48) aperas tri novaj morfemoj : la, k- kaj -iu. La artikolo la signalas, ke la pivoto de la NRK 27 estas la rezulto de nomigo. La relativa morfemo k- havas male la funkcion signali, ke 27 estas NRK, kaj tio praviĝas pro la fakto, ke la nefokusigita "argumento" de 27 (la antaŭsupozita aserto iu ŝevalo haltis) a) ne estas necesse markita per la semantika trajto de samtempeco rilate al la pivoto [nemarkiteco]; b) aplikigas kiel semantika modifanto al la pivoto kaj konfirmas ties noman statuson [aplikeco]. Estante kunreferenca kun la pivoto de la NRK 27, la ekstraktita "argumento" ŜEVALO de MAK 26 ne aperas en la surfaco, sed lasas kiel spuron la nedifinan individuan adjektivon iu, kiu aglutiniĝas kun la relativa morfemo k-. El tiu kuniĝo originas la relativa pronomo kiu. Per si mem la morfemo iu signalas, ke la forstrekita vorto ŝevalo ne projekcias la rezulton de nomigo, sed estas simpla etikedo de la leksika projekcia sistemo.

Estas detalo en la bildigo (47), sur kiun oni devas altiri la atenton : la vertikala sageto kruociĝanta en 27. Tiu sageto, montrante ke la pivoto de 27 rezultas el la ellaboro de jam konata informo (la MAK 26), diferencigas (47) de la bildigo (49) de la noma sintagmo (48) (iu) ŝevalo, kiu haltis (estis kaptita de paŭĉo) :

(49)




En tiu ĉi kazo la pivoto de la korelacio 27', t.e. la noma "argumento" kiu en la surfaco estas projekciata de la leksika etikedo (iu) ĉevalo, estas semantike modifata de la tute nova informo, kiu troviĝas en 26' kaj kiu respondas en la surfaco al la frazo (tiu sama) ĉevalo haltis. Dank' al la surfaca interveno de la relativa pronomo kiu (ĉifoje rezultanta el la kuniĝo de k- kun tiu) la kunreferenca vorto ĉevalo forstrekiĝas kaj tio, kio restas fariĝas la ekspansio en formo de subpropozicio de la ĉefvorto (iu) ĉevalo.


La diferenco inter (47) kaj (49) estas do, ke en (47) el jam konata informo (la korelacio 26) ekestas nova vorto ^{al noma sintagma} kiu implicas tiun informon; dum en (49) iu vorto pliriĉiĝas semantike per la aldono de nova informo (la korelacio 26').

Aparte de la uzo de la rilatpronomo kiu, kiu permesas la plej analizan projekciadon de la semantika enhavo de (47), la sama semantika strukturo en Esperanto povas esti projekciata en la surfaco en pli sinteza maniero pere de la participa morfemo -inta, ekzemple (50) la haltinta ĉevalo [vidu la bildigon (51)]. Tiu ĉi morfemo havas trioblan taskon: 1) ĝi signalas ke oni implicas subjekto-predikatan korelacion kies subjekto estas identa kun la ĉefvorto [elemento -nt-]; 2) ĝi signalas ke la verba "argumento" de la implicita subjekto-predikata korelacio estas en modo indikativo kaj en tenso preterito [elemento -i-]; 3) ĝi signalas ke la implicita subjekto-predikata korelacio insertiĝas kiel nefokusigita "argumento" en la NRK 27 por semantike modifi la noman pivoton [elemento -a]:


(47)



(51)





La sinteza projekciado de fraza strukturo pere de participa morfemo tute ne taŭgas tamen kiam la implicita subjekto-predikata korelacio ne konstituas aserton pri io prezentata kiel vera, sed simplan supozon aŭ hipotezon. Tiam, pro la manko en Esperanto de speciala kondicionalmoda participmorfemo, la analiza projekciado estas neevitebla, ekzemple en (52) (se iu ajn ĉevalo flugas,) la ĉevalo, kiu flugas (, estas nomata Peĝazo) :



Oni rimarku, parenteze, ke (52) demonstras, ke la artikolo la estas esence la signalo de la nomiga procezo, ĉar la indiferente montras kaj, ke la preparolata estaĵo aŭ objekto estas jam konata (kiel elemento de malnova informo aŭ aserto), ekzemple en la transformo iu CERTA ĉevalo haltis → LA ĉevalo, kiu haltis, kaj, ke tiu estaĵo aŭ objekto estas tute nedifinita, ekzemple en la transformo se iu AJN ĉevalo flugas → LA ĉevalo, kiu flugas. Oni devas do konkludi, ke la determina forto de la artikolo dependas nur de la cirkonstanco, ĉu la antaŭsupozita frazo estas interpretata kiel aserto aŭ ne. Se per tiu ĉi frazo la parolanto intencas aserti, ke io efektive okazis, okazas aŭ okazos, la nomo kiu rezultas el la nomiga procezo estas semantike difinita. Alie, se per la antaŭsupozita frazo la parolanto intencas esprimi supozon aŭ hipotezon, sen ankriĝo en la realo, la nomo rezultanta el la nomiga procezo estas nedifinita. Ĉiuokaze la artikolo la signalas nur, ke la koncerna nomo rezultas el nomigo.

La sinteza projekciado de la fraza strukturo estas deviga kiam el la antaŭsupozita frazo oni ekstraktas predikatan "argumenton", nome verbon aŭ kopulon/plus predikativo,

ekzemple (8) la ĉevalo HALTIS → (10) la HALTO de la ĉevalo, aŭ (54) Aleksandro ESTAS SIMILA al Bernardo kaj Bernardo ESTAS SIMILA al Aleksandro → (1) la SIMILECO de Aleksandro kun Bernardo :




En ĉi tiuj ekzemploj la antaŭsupozitaj frazoj (8) kaj (54) tute ne povas eksplicite ĝi en la nomaj sintagmoj (10) kaj (1), ĉar la predikataj "argumentoj" HALT- kaj EST-/SIMILA de la respondaj semantikaj strukturoj (11) kaj (55) forstrekiĝas kiel kunreferencoj kun la pivoto de la nomigaj korelacioj 2 kaj 37, nome HALTO kaj SIMILECO. En tiu forstreko-procezo perdiĝas ankaŭ la ebleco esprimi en la surfaco la tenson kaj la modon per la koncernaj morfemoj, tiel ke parto de la antaŭsupozita informo mankas kaj estas ricevebla nur dand' al la kunteksto. Teorie ekzistus la ebleco esprimi la tenson de la antaŭsupozitaj frazoj (8) kaj (54) pere de vortoj kiel la haltinteco de .. kaj la similitateco de ..; sed tiaj vortoj estus tro pezaj kaj malekonomiaj.

La funkcion signali la ekziston de la NRK 2 kaj 37, anstataŭ la morfemo k- (elemento de la relativa pronomo kiu), transprenas de la prepozicio de, kiu almetiĝas al la solaj nomoj, kiuj restis neforstrekitaj, nome la ĉevalo en (10) kaj Aleksandro kun la ekspansio kun Bernardo en (1).


Estas interese rimarki, ke la konjunkcio kaj de (54) [rilata morfemo por la MRK 36 de (55) inter la du subjekto-predikataj korelacioj 30 kaj 33] transformiĝas en (1) en la prepozicion kun [rilata morfemo por la MRK 36 de (2) inter la du nomaj "argumentoj" ALEKSANDRO kaj BERNARDO], kaj ke la prepozicio al de (54) tute ne aperas en (1). Ne estus ja korekte diri la simileco de Aleksandro al Bernardo, ĉar al ne esprimas reciprokecon. Krom tio, meritas rimarkon la fakto, ke noma sintagmo sen artikolo kiel (56) (jen) simileco de Aleksandro kun Bernardo havas diferencon signifon, nome (57) (jen) unu el la similecoj aŭ similaj trajtoj, kiuj estas inter Aleksandro kaj Bernardo. Tie ĉi simileco ne estas abstrakta kvalito, sed konkreta observaĵo.

Ekzemplo de nomigo de predikata "argumento", en kiu perdiĝas la ebleco esprimi la modon, estas (58) (estas necese,) ke oni plievoluigu la projekton → (60) la plievoluigo de la projekto (estas necesa). Laŭ nia modelo, inter (58) kaj (60) oni devus supozi la transforman stacion (59) (estas necese,) ke la projekto estu plievoluigata kaj la subjunkcio ke indikas, ke la tuta fraza strukturo estas jam nomigita; kp. la parafrazojn la fakto, ke la projekto estu plievoluigata (estas necesa) kaj (estas necese) plievoluigi la projekton. Ni bildigas la semantikan strukturon de (58), (59) kaj (60) jene:




Kiel ni vidas, la vakua pivoto indikata de ke en (61) kaj (62) pleniĝas en (63) per la nomigita predikata "argumento" ○ de la subjekto-predikata korelacio 41. La nomigo kuntrenas la forstrekon de la kunreferenca "argumento" kune kun ĝia u-modo, tiel ke en la surfaco aperas nur la nomo la projekto, kiu sola reprezentas la antaŭsupozitan frazon la projekto estu plievoluigata(de oni). La funkcion de ke transprenas la prepozicio de.

Perdiĝas la ebleco esprimi la modon ankaŭ kiam la frazo (58) transformiĝas en (64) (estas necese) plievoluigi la projekton, t.e. kiam la nomigo estas projekciata en la surfaco per la infinitivo, nome ^{la} surfaca formo kiu permesas forlasi la indikon de la subjekto kaj konservi, kiam necesas, la indikon de la objekta komplemento. Ni bildigos la transformon de (58) al (64) per la kunfiguroj (61) kaj (65) :



Tiu ĝi maniero bildigi la infinitivon kiel specialan formon de nomigo ebligas al ni pritrakti konsekvence nomajn sintagmon, kiu antaŭsupozas la frazon (66) estas necese plievoluigi la projekton, nome (67) la neceso plievoluigi la projekton. Ni bildigos la transformon de (66) al (67) per la kunfiguroj (68), (69) kaj (70) :



La semantika strukturo (70) montras, ke la noma sintagmo (67) la neceso plievoluigi la projekton entenas du nomigojn : tiu, kiu rezultas el la ekstrakto de la predikata "argumento" EST- NECESE, t.e. la neceso, kaj tiu, kiu rezultas el la infinitiv-igo de (58) ke oni plievoluigu la projekton, t.e. plievoluigi la projekton. En (67) ne ekzistas ia morfemo por signali la epitetan rilaton de la infinitiva sintagmo al la ĉefvorto la neceso, kaj tio estas karakterizo de Esperanto kompare, ekzemple, kun la itala, kie en tiu ĉi kazo la infinitivo estas enkondukata de la prepozicio di (= Esp. de) : la necessità DI sviluppare ulteriormente il progetto.


Nomigo per ekstrakto de predikativo

Ĝis nun ni konsideris nur ekzemplojn de nomigo, kiuj rezultas el la ekstrakto, el antaŭsupozita fraza strukturo, de noma "argumento" aŭ de predikata "argumento", ĉi lasta respondanta ĉu al verbo, ĉu al kopulo plus predikativo; kp. (46) (iu certa) CEVALO haltis → (48) la CEVALO, kiu haltis, ; (8) la ĉevalo HALTIS → (10) la HALTO de la ĉevalo; (54) A. ESTAS SIMILA al B. kaj B. ESTAS SIMILA al A. → (1) la SIMILECO de A. kun B.

Restas nun por demandi, ĉu eblas ekstrakti el antaŭsupozita frazstrukturo nur la predikativon, sen la kopulo, kaj nomigi ĝin. Tiu ĉi tipo de nomigo ludas, kiel ni vidos poste, gravan rolon por la estigo de nomaj sintagmoj karakterizataj de ki-pronomoj kaj -adjektivoj, ekzemple (mi ne scias,) kiu (gaŭĉo) haltigis la ĉevalon, sed en aliaj kazoj ĝi ŝajnas esti tute nekutima.

Ekzemplon de tia nomigo ni povus tamen trovi, se Esperanto permesus, kiel la itala kaj kelkaj aliaj lingvoj, familiarajn esprimmanierojn kiel (71) tiu stultulo de Aleksandro (Ĝenis min jam tro milte!), itale quello stupido di Alessandro (mi ha già seccato troppo!). (71) povus esti parafrazata per (72) tiu stultulo, kiu estas Aleksandro (...) kaj esti rigardata kiel la ekstrakto kaj nomigo de la predikativo stultulo entenata en la antaŭsupozita frazo (73) Aleksandro estas stultulo.

Laŭ nia modelo la semantika strukturo de (71), (72) kaj (73) estas respektive bildigebla per (76), (75) kaj (74) :



En (74) la predikativa "argumento" de la korelacio 45 estas (IU CERTA) STULTULO :
 kp. (73) Aleksandro estas (iu certa) stultulo. En (75) la predikativo estas
 ekstraktata kaj nomigata, sed spuro de ĝi konserviĝas en la surfaco dank' al la
 rilativa pronomo kiu [= k- plus -iu (certa stultulo)] de (72) tiu stultulo, kiu
estas Aleksandro. (76) prezentas fine sintezan varianton de (75), en kiu la antaŭ-
 supozita fraza strukturo (74) estas simple aludata pere de la prepozicio de :
 (71) tiu stultulo DE Aleksandro. Komuna karakterizo de (71) kaj (72) estas la
 adjektivo tiu, kiu, anstataŭ la artikolo la, havas la specifan funkcion signali
 tiun ĝi apartan tipon de nomigo.

NOMIGO PERE DE TI- AŬ KI-PRONOMOJ KAJ ADJEKTIVOJ.


Kiam pro ekonomiaj aŭ stilaj kaŭzoj oni volas produkti nomigon sen eksplicite
 ekstrakti el antaŭsupozita fraza strukturo la koncernan "argumenton", en espe-
 ranto oni nomigas tiun "argumenton" anstataŭigante ĝin per ti-pronomo, ekzemple :
 (77) TIU, kiu haltigis la ŝevalon ← (18) la gaŭŝo aŭ (iu) gaŭŝo haltigis la
ŝevalon [(77) anstataŭ (78) la gaŭŝo, kiu haltigis la ŝevalon];
 (79) TIU, kiun haltigis la gaŭŝo ← (18) la gaŭŝo haltigis la ŝevalon aŭ (iun)
ŝevalon [(79) anstataŭ (80) la ŝevalo, kiun haltigis la gaŭŝo];

(36) TIO, kion faris la gaŭĉo al la ŝevalo ← (38) la gaŭĉo faris al la ŝevalo la agon ĉin haltigi [(36) anstataŭ (81) la ago haltigi la ŝevalon, kiun la gaŭĉo faris (al tiu ŝevalo)];



(82) TIO, kio Aleksandro estas ← (73) Aleksandro estas stultulo [(82) anstataŭ (72) tiu stultulo, kiu Aleksandro estas];

(83) TIE, kie la fakto okazis ← (42) la fakto okazis en la pampo aŭ (44) la fakto okazis ĉe la herbejfino [(83) anstataŭ (84) en la pampo, kie okazis la fakto aŭ (85) ĉe la herbejfino, kie okazis la fakto].

El la supre menciitaj nomaj sintaksoj, kies ŝefvorto estas ti-pronomo, sufiĉas bildigi nur la semantikan strukturon de (82) kaj (83), respektive per la kunfiguroj (86) kaj (87)-(88) :




(morfofonemika regulo: k- + io = kio)



(morfofonemika regulo: k- + en/ĉe io = kie)


Nature la aluda nomigo pere de la ti-pronomoj funkcias ankaŭ kiam la "argumento" de la antaŭsupozita fraza strukturo estas semantike tute nedifinita. Ekzemple, se mi ne scias, kiu persono haltigis la jam ofte cititan ĉevalon, mi asertas: (89) iu (nekonata persono) haltigis la ĉevalon. La nomigo de (89) surbaze de la nedifinita subjekto iu estas (90) TIU, kiu haltigis la ĉevalon kaj estas por rimarki, ke la noma sintagmo (90) nur surface estas identa kun (77), ĉar dum ĉilasta estas anstataŭebla per (91) tiu gaŭĉo, kiu haltigis la ĉevalon, (90) povas maksimume transformiĝi en (92) la (nekonata) haltiginto de la ĉevalo.

Pere de (90), sed ne pere de (77), oni povas konstrui frazon kiel (93) TIU, kiu haltigis la ĉevalon estas la gaŭĉo, ebla respondo al la demando kio haltigis la ĉevalon?, kaj tipo de frazo, kiun ordinaro oni nomas "fendita propozicio" (angle "cleft sentence"); vidu la respondan bildigon (94):



Sed la noma sintagmo (90) servas ankaŭ por krei frazon unuavide tute senutilan el la informa vidpunkto, kiu estas tamen esenca por la kompreno de la semantika strukturo de la demando kio haltigis la ĉevalon?, nome (95) TIU (nekonata persono), kiu haltigis la ĉevalon estas iu (nekonata persono); vidu la respondan semantikan bildigon (96):


(96)




La taŭtologio (95) estas grava, ĉar el ĝi oni produktas per nomigo la pluan noman sintagmon (97) kiu estas tiu, kiu haltigis la ŝevalon kaj ĝian sintezan varianton (98) kiu haltigis la ŝevalon de la dependa demando (99) mi ne scias, kiu (estas tiu, kiu) haltigis la ŝevalon, kaj de la rekta demando (100) kiu (estas tiu, kiu) haltigis la ŝevalon ?.

La tradicia gramatiko ĉiam rigardis la ki-demandojn kiel specialan tipon de frazo, kiu en la kazo de la dependaj demandoj [vidu (99)] funkcias kiel la objekta komplemento de apartaj verboj kiel sci (ne koni), esplori, ekzameni, demandi, studi kaj similaj. Laŭ nia modelo male la ki-demandoj ne konstituas frazon, sed nomigitan sintagmon, kies ŝefvorto ne estas eksplicita kaj kiu originas el taŭtologia frazo kiel (95) [vidu (96)], dank' al la ekstraktado de ĝia nedifinita predikativo. Pro tio ni bildigos la semantikan strukturon de la demandoj (99) kaj (100) respektive per (101)-(102) kaj (103)-(104) :


(101)




(102)



(103)



(104)




La analiza variantoj de la demando (99) mi ne scias, kiu estas tiu, kiu haltigis la ĉevalon estas prezentata de la bildigo (101) kiel la inserto en la verbo-objektan korelacian 56 (siavice insertata en la subjekto-predikatan korelacian 55) de noma "argumento" kun funkcio de objekta komplemento, kio rezultas el la nomigo de la antaŭsupozita fraza strukturo (96) dank' al la ekstrakto de la nedefinita predikato IU. En la surfaco la pivoto de la nomiga korelacio 54 ne estas projekciata kaj konsekvence falas la obleco marko per akuzativo la objektan komplementon de la verbo ne scias.

La objekto de la sama verbo ne estas markata ankaŭ en la sinteza variantoj de (99), t.e. mi ne scias, kiu haltigis la ĉevalon. Kiel montras la bildigo (102), tiu ĉi frazo originas el la forstreko de la korelacia subkunfiguro 51-50-53 kaj el la inserto kiel nefokusigita "argumento" de la nomiga korelacio 54 de la fraza strukturo respondanta al la antaŭsupozita aserto (89) iu (nekonata persono) haltigis la ĉevalon. Estas ĝuste tiu ĉi antaŭsupozitaĵo tio, kio pravigas la ekeston de la demando, ĉar la demando celas informon pri la identeco de tiu nekonata persono. La demandojn tamen oni plej ofte faras rekte, subkomprenigante la frazon la parolanto demandas la jenon. Estas tiu la kazo de (100) en ĝiaj analiza kaj sinteza variantoj (100a) kio estas tiu, kiu haltigis la ĉevalon? kaj (100b) kio haltigis la ĉevalon?.

Per la bildigoj (103) kaj (104) ni do proponas la tezon, ke la rektaj demandoj nenio alia estas ol speciala tipo de nomaj sintagmoj, rezultantaj el la nomigo de taŭtologia frazo kiel (96) perede la ekstrakto de ties nedifinita predikativo.

Oni povus rigardi tiujn nomajn sintagmojn kiel la objekton de subkomprenata demanda verbo ; sed estus ankaŭ eble ilin rigardi kiel la konstituantojn de senpredikata propozicio, formata nur de subjekto, per kiu, dank' al aparta signifa intonacio, la parolanto invitas la aŭskultanton trovi la koncernan predikaton, nome la respondo. Se la respondo provokata per (100) estas (105) estas la gaŭĉo!, ni povus teorie konstrui la frazon (106) TIU, kiu (estas tiu, kiu) haltigis la ĉevalon, estas la gaŭĉo!, kunigante la subjekton (100) kun la predikato [kopulo plus predikativo] (105) estas la gaŭĉo! ; vidu la bildigon (107) :




Kiamaniere bildigi rektajn demandojn kun la demandadjektivo kiu.

Supre ni proponis la bildigon de demandaj nomaj sintagmoj enkondukataj de la demandopronomo kiu. La interogativo kiu funkcias tamen ankaŭ kiel demandadjetivo, ekzemple en (108) kiu gaŭĉo haltigis la ĉevalon?.

Estas tuj por rimarki, ke la diferenco inter la interogativa nomsintagmo (100) kaj la interogativa nomsintagmo (108) konsistas el la fakto, ke la antaŭsupozita frazo de (108) ne estas la aserto (89) iu (nekonata persono) haltigis la ĉevalon, sed (109) iu (nekonata) gaŭĉo haltigis ĝin. La celo de la demando (108) estas do identigi inter la membroj de la "klaso" de la gaŭĉoj tiun apartan gaŭĉon, kiu faris la agon indikatan de la verbo de (109).


Ni opinias, ke adekvata semantika priskribo de la interogativa nomsintagmo (108) kiu gaŭĉo haltigis la ĉevalon? devas necese enteni la semantikan bildigon de la antaŭsupozita frazo (109) kaj montri, ke (109) kapablas transformiĝi en la nomsintagmon (110) la (nekonata) gaŭĉo, kiu haltigis la ĉevalon. Krom tio, la bildigo de (108) [vidu (113)] devas ankaŭ enteni la taŭtologion (111) la (nekonata) gaŭĉo, kiu haltigis la ĉevalon, estas iu (nekonata gaŭĉo) kaj montri, ke el tiu taŭtologio kreiĝas la interogativa nomsintagmo (112) kiu estas la (nekonata) gaŭĉo, kiu haltigis la ĉevalon? :

(113)



Pro sia analiza karaktero la bildigo (113) ankoraŭ ne respondas al la interogativa nomsintagmo (108) kiu gaŭĉo haltigis la ĉevalon?, sed sufiĉas la bildigo (114) por klarigi, ke (108) estas nur la sinteza vortigo de (112) kiu estas la gaŭĉo, kiu haltigis la ĉevalon?, nome la rezulto de la forstreko de la korelacia subkunfiguro 62-61-63 kaj de la inserto de la strukturo de la antaŭsupozita frazo (109) iu gaŭĉo haltigis la ĉevalon kiel nefokusigita "argumento" de la nomiga korelacio 64 :

(114)



(morfofonemika regulo: k- + iu = kiu)